

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

La Espero

2018:3

Kultura Esperanto-Festivalo 2018 en Lesjöfors



La planita KEF, kiel Kultura Esperanto-Festivalo 13-19 julio 2018 ekhavis iom alian nomon kaj iĝis intima Kultura Esperantofesto de esperanta kreemo kaj interkomprenemo. Helena Kotilainen prizorgis praktikajojn surloke antaŭe, dume kaj poste, jen kun Sigrid Sjöstrand kaj Agneta Emanuelsson, kiu venis viziti per ruldomo.

Legu pli sur paĝo 4.

“Sångtävling för skolungdomar – vinn en språkresa”

När: 25 September kl. 09:00-15:00
Var: Europahuset, plan 2, Regeringsgatan 65, Stockholm

EUROPEISKA SPRÅKDAGEN

Tävling: skriv en sång om ett språk och vinn en språkresa

Sista anmälningsdag:
Måndagen den 17 september

Läs mer på www.sprakdagen.se
eller kontakta oss på tavling@stockholm.goethe.org

Den europeiska språkdagen firas i form av ett språkcafé i Europahuset i Stockholm tisdagen 25 september där *Tatu Lehtilä* och *Olof Pettersson* representerar Esperantoförbundet. Själva språkcaféet riktar sig till högstadie- och gymnasieungdomar i Stockholmsområdet och är redan fullbokat, men webbtävlingen är öppen för ungdomar i hela landet. Första pris är en språkresa för en person, och tävlingen går ut på att skriva och spela in en sång om språk på något annat språk än svenska eller engelska – alltså exempelvis på Esperanto!

Läs mer om reglerna på www.sprakdagen.se.
Sista dagen för att skicka in bidrag är 17 september.

NÄR: 25 SEPTEMBER
KL. 9:00-15:00

VAR: EUROPAHUSET, PLAN 2
REGERINGSGATAN 65
STOCKHOLM

EUROPEISKA SPRÅKDAGEN

Tävling: Skriv en sång om ett språk och vinn en språkresa

Läs mer på www.sprakdagen.se eller kontakta oss på tavling@stockholm.goethe.org

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2018 • 106-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

svenska@esperantoforbundet.se

E-post till redaktionen: laespero@esperantoforbundet.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

Tryck: Pingvinpress, Råå

Prenumeration: 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Postadress: Box 2276, 103 17 Stockholm

E-post: svenska@esperantoforbundet.se

Nätsida: www.esperantoforbundet.se

Plusgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

IBAN-konto: SE50 9500 0099 6034 0002 0123

Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

UEA-avgifter och prenumerationer: Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 070-6200846

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: c/o Nordenstorm

S:t Olofsgatan 26; 753 32 Uppsala

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto-gbg.org/eldona/

E-post: eldona@esperantosverige.se

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.esperantogarden.se

E-post: info@esperantogarden.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

e-post: laespero@esperantoforbundet.se

	<i>Stoppdatum</i>	<i>Utkommer senast</i>
Nr 1	1 februari	1 mars
Nr 2	15 maj	5 juni
Nr 3	20 augusti	15 september
Nr 4	1 november	1 december

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

LA ESTRARO

Styrelsearbetet är nu igång igen efter sommaren. Styrelsen består sedan årsmötet i maj av Puff Östling (ordförande), Olof Pettersson (vice ordförande), Ann-Louise Åkerlund (sekreterare), Arnulf Naif (ledamot) och Tatu Lehtilä (ledamot), med Jin Guo och Lotta Lauritz som ersättare.

Vi har ännu inte hittat och utsett någon ny ordinarie **kassör**. Olof är tillförordnad och sköter utbetalningar, men för bokföringen kan vi bli tvungna att anlita en bokföringsbyrå, vilket kommer att innebära en kostnad för förbundet.

Som vi har meddelat tidigare kommer styrelsen inte att ansvara för att anordna **kongress** nästa år utan bara kalla till årsmöte. Nästa år kommer årsmötet preliminärt att hållas den 1 juni på Postmuseum i Stockholm. Eventuella kringaktiviteter kommer då klubbarna i Stockholm och Uppsala att stå för.

Styrelsemötena hålls via Skype ungefär en gång per månad men vi har också två fysiska möten per år, i samband med årsmötet och en gång under hösten. I höst träffas vi i Uppsala den 15-16 september. Vi arbetar också med att, liksom vid ett par tidigare tillfällen, inbjuda till en s.k. Funktionärsträff första eller andra helgen i oktober i Herrljunga. Inbjudan kommer att gå till klubbar och grupper att skicka lämpliga representanter på förbundets bekostnad.

Som vanligt kommer vi att delta i Europeiska **Språkdagen** i form av ett språkkafé i Europahuset i Stockholm den 25 september. Göteborgsklubben kommer återigen att bemanna vår monter vid Bokmässan 27-30 september och med hjälp av Stockholmsklubben deltar vi i Mänskliga Rättighetsdagarna 15-17 november i Stockholmsmässan.

För att stödja Esperantogårdens arrangemang KEF (**Kultura Esperanto-Festo**) i juli har SEF-styrelsen bifallit E-G:s ansökan om projektbidrag och översänt 15.000 kronor. Bilder med fylliga bildtexter i detta nummer ger er en god inblick i vad som ägde rum.

Eftersom det har visat sig att en del köpare av vårt **Startpaket** inte betalar fakturan trots påminnelser så har styrelsen beslutat att begära betalningen innan paketet skickas ut. Vi har hittills skickat fakturan med paketet men kommer nu att ändra texten på hemsidan till att man måste betala in avgiften för att få paketet tillsänt.

Stokholmanoj kunvenis en someraj kafejoj

Klubanoj de Stockholm kunvenis kvar fojojn dum la somero en kafejoj, kaj krome en printempa festo en majo.

Por la printempa festo estis kantado kun violona muziko de Agneta Järnlström, kaj ankaŭ vizito de gasto en Brazilo, kaj poste bona salato kaj parolado al la printempo kun printempa poezio.

Kafejoj ĉe Fjällgatan, Erstaterrassen kaj Fåfången en Stockholm situas en la turisma parto kun bela elrigardo al la akvo kaj aliaj urbopartoj. Alia kafejo estis Skanskvarn. En tiu kunveno en junio venis gasto studento Holden Lee el Usono, kiu partoprenis profesion konferencon pri maŝina instruado, kaj kiu mem serĉis kaj trovis la kunvenantojn.

Ulla Luin



En kunveno de kafejo Skanskvarn, sur la bildo, de maldekstre: Soile Lingman, Anders Sundman, Holden Lee, Tatu Lehtilä, Gunnar Gällmo, Claes-Göran Ingestedt. (Fotis: Ulla Luin)



Helsingborganoj manĝis vaflojn en Pålssjö

La esperantoklubo en Helsingborg dum sia unua aŭtuna renkontiĝo vizitis la tombon de G H Backman memore al lia morto antaŭ 90 jaroj. Poste ni promenis al la Vaflo-paviliono en la arbaro.

Aŭtune la klubo kunvenos en la urba biblioteko 22/9, 27/10 kaj 24/11.

Ann-Louise

Sur la bildo videblas Helga, Arvid, Jill kaj Lena. Ann-Louise fotis

Ekumena kongreso en Ĉeĥio

Mi kun familio ĉi-somere partoprenis en la Ekumena Esperantista Kongreso en Podebrady (oriente de Prago). Entute ĉirkaŭ 80 partoprenantoj el 13 landoj kongresis dum unu semajno. Inter alie ni estis 6 personoj el Svedio (krom nia familio: Agneta Järnlström, Anna & Mats Landfors) kaj 4 el Japanio.

Kiel kutime la programo enhavis prelegojn, kantado-horojn, kulturajn programojn kaj ekskursojn. Dum unu ekskurso ni vizitis la nacian ĉevalbredejon en Kladruby nad Labem de kie ankaŭ svedaj parad-ĉevaloj ĉe la Reĝa Gardistaro (Högvakten) venas.

Bengt Olof Åradsson


Japaninoj prezentis fabelon per flanelotabulo.



Ĉi-somere en Esperanto-Gården



Gijom' Armide (Guillaume Hamrade) pensigis kaj emociigis nin dum siaj programeroj pri SenPerforta Komunikado (vidu sube pri SPK) kreita de Marshall B. Rosenberg por favorigi la konekton inter la homoj trans ties paroloj, pensoj, opinioj. Je malagrabra interna reago al alia persono gravas aliri plejeble observan staton por kompreni la sentojn, la proprajn unuavice surbaze de siaj bezonoj, kiuj estas baze samaj por ĉiu, tiel ligante la komprenon pri bezonoj ankaŭ de tiu alia. Sur tia korcentrita fundamento eblas komuniki homo inter homo malgraŭ konfliktaj eldiroj kaj agoj, ofte profunde vundaj, sed ankaŭ profunde homaj.



Eddy Van den Bosch kaj Ella Strug por la dua jaro sinsekve venis de Belgio prizorgi la kontenton de la partoprenaro per ĝojoplena, multflanka kaj bongusta kuirado. Arnulf Naif (meze) prelegis pri la kurda lingvo kaj situacio. Fone Bengt Nordlöf.

Martin Strid prezentis superrigardon de tonsilaboj, sistemo kiun li kreis por facile noti melodiojn, dekstre Samyar Modabber de Irano loĝanta en Danlando, kaj filmanta Aleksej Salomatov de Ruslando.



Samyar Modabber renovigis la Esperanto-Gården-ŝildon per blanka farbo kaj, krome, la retejon www.esperantogarden.se, pri kies prizorgon li pretas daŭre subteni dum aliaj aktivuloj iom post iom riĉigos la enhavon.

Senperforta komunikado (SpK) estas koncepto evoluigita de Marshall B. Rosenberg. Sinonimoj estas kunsentema komunikado, konektiga komunikado, lingvo de la koro aŭ ĝirafa lingvo. La maniero laŭ kiu homoj kutime komunikas tute ne estas "senperforta", ĉar la homaro vivis dum miloj da jaroj en kulturo bazita sur hierarkio, regado kaj subpremo. Malfeliĉo, frustrado aŭ kolero ne estas la problemo, sed jes la maniero laŭ kiu esprimiĝas negativaj sentoj, depende de kiel iu parolas el si mem aŭ vorte vundigas la alian. Kverelo iĝas konflikto, se ĉiuj restas konviktaj de sia propra opinio kaj dialogo ne havas ŝancon.

Kiam homoj uzas lingvaĵon kiu provokas timon, honton aŭ kulpon en konflikta situacio, la atento de la alia persono deturniĝas. "Perforta" lingvo malhelpas al homoj klare vidi siajn sentojn, bezonojn kaj petojn. La konflikto intensiĝas ĉar la "perforta parto" kaŭzas kontraŭ-perforton.

Senperforta komunikado utilas kaj en la ĉiutaga komunikado kaj por pace solvi konfliktojn en persona, profesia aŭ politika medioj. Per praktikado de SpK, vi povas obteni pli efikajn komunikadokapablojn por solvi konfliktojn, plibonigi kunlaboron kaj plibonigi la laboretoson. Uzado de korlingvo estas bonfartiga vojo al reciproka plezuro.

El Vikipedio

Vortaro: 17 literoj prilaborataj

Ekde la komenco de jaro 2017, grupeto da membroj prilaboras la manuskripton de Roland Lindblom pri esperanto-sveda vortaro.

La alfabeto de esperanto havas 27 literojn, kaj el ili nun 17 literoj estas prilaborataj. Grupo de 7 personoj dividas tiujn literojn inter si, sub gvido de Leif Nordenstorm.

La laboro estas videbla per interreto:

<http://www.esperanto-gbg.org/eldona/test/soktest.html>.

Provu enskribi komencon de vorto, ekzemple: *al, ba, ce, dan, ele*. Vi vidos liston de vortoj je tiuj komencaj literoj.

Esperanto ja estas lingvo kiu facile kunmetas vortojn, kaj tial vi povos jam vidi ankaŭ vortojn je aliaj literoj, kiuj ne estas ankoraŭ prilaborataj, provu ekzemple: *fa, ga*.

Literoj A-E, L-P, kaj R-Z estas parte enskribitaj, kaj kelkaj el ili estas pli-malpli komplete enskribitaj sed necesos ankoraŭ kontrol-lego.

Ulla Luin

[Uppdaterad 2018-04-27] Sök esperanto-ord (mellan ŝ och

ba
turo: Babela turo Babels torn
yagono: bagagvagono bagagevagn
trikrako: bakgamono
vergo: verga balailo (ris) kvast
urno: baloturno valurna (för valsedlar)
ŝorto: banŝorto badshorts
tuko: bantuko badhandduk
volbo: barelvolbo tunnvalv
ŝipo: barĝoŝipo pråmbogserande fartyg, bogserbåt
trabo: bartrabo bom
ŝalti: baskulŝaltilo vippströmbrytare
tensio: bastensia lineo lågspänningsledning (för eldistribution)
violono: basviolono (mus) basfiol, kontrabas
ŝipo: batalŝipo stridsfartyg
ŝargi: malŝargitaj baterioj urladdade batterier
zono: zubzona bato slag under bältet
tago: bazartago torgdag
tono: baztono (mus) grundton

Esperantopioniro el Helsingborg – Gustav Henrik Backman

GH Backman naskiĝis la 4-an de aprilo 1867 kaj mortis, nur 61-jara, la 14-an de julio 1928. Li estis kurac-gimnastikisto (fizioterapisto) kaj loĝis interalie en Ramlösa Brunn. Li fondis la unuan esperantoklubon en Helsingborg, jam antaŭ la fondiĝo de Sveda Esperanto-Federacio (en decembro 1906).

Dum la Esperanto-Tago en Stokholmo 1916 Backman rakontis pri sia esperantistiĝo. Li kuŝis en malsanulejo, kie la kuracistoj konsideris lin “neriparebla” (laŭ liaj propraj vortoj). En la lito li komencis studi esperanton kaj la rezulto estis ke li resaniĝis.

Backman eldonis 4 lernolibrojn, la unuan jam en 1892, post kontakto kun Zamenhof. Pri tiu libro la konata kaj agema Paul Nylén skribis en sia nekrologo pri Backman, ke li antaŭ 36 jaroj ekvidis ĝin en libreja fenestro en Falun, aĉetis kaj fariĝis esperantisto. Krom la lernolibroj Backman eldonis vortarojn kaj tradukis *La konscienco riproĉas* de Aŭgust Strindberg.

Eble pro la kontaktoj kun Backman Zamenhof decidis viziti Helsingborgon en aŭgusto 1908, lige al sia vojaĝo al Danio post la UK en Dreseno.

Backman nelacigeble agadis, konstante gvidis kursojn kaj propagandis ĉiumaniere. Li en 1909 faris propagandan vojaĝon en Germanio kune kun grupo de knabinoj, kiuj senpage studis esperanton ĉe la geedzoj Backman. Li klopodis eldoni la gazeton Esperanto-Folket 1911-1912, aranĝis en 1911 en Helsingborg la unuan landan kongreson ekster la ĉefurbo kaj estis tre aktiva en la aranĝado de la unua Skandinava Kongreso de Esperanto en Gotenburgo en 1918. Dum la printempo antaŭ sia morto li donis esperantolecionojn per la radio.

Dum la sveda kongreso en Helsingborg 1943 la prezidanto de SEF, Paul Nylén, parolis ĉe la tombo de Backman. Same faris en 2012 nia tiama prezidanto Roland Lindblom.

Jill kaj Ann-Louise



La konscienco riproĉas de Aŭgust Strindberg estas legebla kiel bitlibro ĉe Inko: <http://web.archive.org/web/20060810183528/http://www.luin.se/inko/061-9.pdf>

Se mi ne venas por aŭskulti ministron – la ministro venas al mi.

Fakte tio okazis al mi la 19an de aŭgusto. La pensiula organizo PRO invitis la financon ministrin Magdalena Andersson al Lerum por respondi al demandoj pri zorgado de maljunuloj. Mi ne iris tien.

Posttagmeze du gejunuloj frapis la pordon. Ili venis de la socialdemokrata partio. Se ne temas pri la plej dekstraj kaj la



plej maldekstra partioj mi bonvenigas la junajn politikistojn. En Lerum troviĝas kvar komunumaj ĉefkonsilistoj (C, L, S kaj Mp). La kvar partioj laboras kune kaj la kunlaboro funkcias bone!

Do, ni interparolis iomete pri la cirkonstancoj en mia komunumo.

Post kelkaj minutoj venis de la parkejo virino vestita en helblua bluzo, sekvata de du viroj. La junuloj demandis: “Ĉu vi rekonas la finansministron Magdalena Andersson?” Kompreneble.

Ĉar la junuloj jam parolis tiom multe pri politiko mi komencis paroli pri esperanto kun la ministro. Jes, ŝi diris, la ideo estas bona. Mi ankaŭ informis pri nia biblioteko en Stannum kun pluraj planitaj lingvoj. En la unua etaĝo mi

ĵus finpretis modelon de nia budo en la venonta Libro- kaj Biblioteko-Foiro fine de septembro. Mi invitis Magdalenon iri supren por rigardi. La du viroj – korpogardistoj – eble pensis ke ne estus danĝero por la ministro iri kun mi kaj ili restis ekstere kune kun la junuloj. Magdalena rigardis la librojn, terglobon, afiŝojn k.t.p., prenis kelkajn broŝurojn, kaj post momento ni revenis al la atendantaj korpogardistoj.

Mi bedaŭras ke politikistoj nuntempe devas havi gardon.

Ĉu la S-politikistoj sukcesis igi min voĉdoni por sia partio? – HMMMMM?

Ĉu mi sukcesis konvinki la ministrin pri la graveco de esperanto? – HMMMMM?

Sed tamen estis agrabla renkontiĝo!

Siv


BOKMÄSSAN

SEF och Eldona deltar åter i Bokmässan efter ett par års uppehåll. Göteborgs Esperantoförening står för det praktiska. Du hittar vår monter H01:01 på det Internationella torget. Vi kommer att vara där redan från torsdagen då det är fackmässa. Allmänheten släpps in följande tider: fredag 14.00–19.00, lördag 09.00–18.00, söndag 09.00–17.00. Välkommen!



Titta på www.esperanto-gbg.org för att t.ex. läsa *Ora Ĵurnalo* Nr 9 = augustinumret är det senaste. Det handlar mycket om Polen. Vi jobbar nu på septembernumret och hoppas det kommer ut innan vi (9 göteborgare) åker till Gdansk-Gdynia 5–9 sept. för att vara med på Esperanto på stranden.

/Siv



La korto de Kristian Lundberg

La laŭdata libro de Kristian Lundberg troviĝas ankaŭ en nia lingvo. Kaj sufiĉe longe ĝi restis nelegita sur mia librobreto. La libro temas pri malfacila periodo en la vivo de la verkisto, kiam li ne povis vivteni sin kiel verkisto kaj pro ŝuldoj devis eklabori en suba socia tavolo por malmulte da mono. Kvankam la libro baze temas pri Kristian Lundberg la leganto povas en ĝi ankaŭ ekkoni la situaciojn en kiuj multaj personoj laboras kaj vivas en nia nuntempa socio, kie la riĉuloj riĉiĝas kaj la nombro de malriĉuloj kreskas.

Gunnar Gällmo tradukis la libron kaj mi trovas ĝin facile legebla.

Inter alie ĝi estas aĉetebla por 70 kr ĉe la retbutiko Agera: <http://www.ageradistribution.net/agera/sv/esperanto-/660-la-korto.html>

Bengt Olof Åradsson

Bialystok ordnar tävling

Literatura Konkurso 2018

“Valoras lerni Esperanton, ĉar...”

Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki en Bjalistoko kaj Bjalistoka Esperanto-Societo anoncas la 8an literaturan konkurson “Esperanto ligas homojn” por rakonto sub la titolo “Valoras lerni Esperanton, ĉar...”.

La konkurso okazas sub honora protektado de la Urbestro de Bjalistoko.

Celoj de la konkurso

1. Disvastigi la idearon de Esperanto kaj de la lingvo iniciita de bjalistokano Ludoviko Lazaro Zamenhof kiel universala, supernacia komunikadrimedo de la homoj.
2. Inspiri al ĉiuj legi beletron.
3. Estigi la ŝancon je malkovro kaj disvastigo de literaturaj talentoj per verkado kaj taksigado de literaturaj tekstoj.
4. Provi pritaksi la mondon, kiu nin ĉirkaŭas, en la kunteksto de komuna lingvo.

Respondeculoj pri ĝia realigado

- Przemysław Wierzbowski, retadreso: wierzbowski@espero.bialystok.pl
- Elżbieta Karczewska, retadreso: f14kp@ksiaznicapodlaska.pl

Pli da informo, aliĝilon kaj konkurson regularon vi trovas surrete: espero.bialystok.pl/eo/literatura-konkurso-2018/

Se vi havas demandojn, kontaktu nin per la retadreso f14kp@ksiaznicapodlaska.pl aŭ telefonnumero +48 791 856 034

*Przemysław Wierzbowski, Prezidanto de BES
Jolanta Gadek, Direktoro de Podlaĥia Libraro*



Polska gäster på sommarkursen i Göteborg

Isarabete med ILEI och Vuxenskolan deltog 18 personer, bl.a. fyra från Gdansk i Polen. Ledare för nybörjarna var Sten Svenonius, för fortsättarna Inga Johansson och konverserarna Andreas Nordström. Fredagen den (29/6) var utflyktsdag. Polackerna och några andra deltagare gjorde också en utflykt på lördagen. Att ha deltagare från andra länder var mycket lyckat, vilket inspirerade många av deltagarna att åka till Polen 5–9 september för att delta i esperantoträffen “Esperanto sur la strando” i Gdynia–Sopot.

(El Membroletoro de Esperanto-Societo de Gotenburgo)



Provu Amikumu! Amikumu estas plursistema aplikaĵo por saĝtelefonoj (Android kaj iOS) per kiu oni povas trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn aŭ parolantojn de aliaj lingvoj.

La aplikaĵo funkcias dumaniere. Oni povas trovi proksimajn esperantistojn per listo aŭ per mapo. Per la apo eblas sendi mesaĝojn kaj komuniki kun samlingvanoj. La aplikaĵo lanĉiĝis por esperantistoj je la 22-a de aprilo 2017. Pli da informo vi trovas je <https://amikumu.com/eo/>. Tie vi povas vidi la aktualan statistikon pri uzantoj (vidu apude). /Red

Statistikoj

Rank	Language	Speakers	Native
1	English (eng)	10408	3584
2	Esperanto (epo)	9325	126
3	Spanish (spa)	4350	1291
4	French (fra)	4241	1081
5	German (deu)	3439	682
6	Portuguese (por)	1782	887
7	Italian (ita)	1741	315
8	Russian (rus)	1632	578
9	Japanese (jpn)	1391	184
10	Chinese (zho)	1352	539
11	Dutch (nld)	820	279
12	Polish (pol)	646	296
13	Swedish (swe)	495	119

Antaŭ unu jarcento

En la ĉi tie prezentata libro ni legas: “Ĉiu milito estas absurda, ĉar ĉiu milito estas pli malbona ol atendite. Ĉiu milito prezentas absurdan situacion, ĉar ĝiaj rimedoj estas tiom sen proporcio kun ĝiaj pretendataj celoj.”

Unu tia absurdaĵo estis la unua mondmilito (1914-1918), kiu ofte nomiĝis la granda milito antaŭ ol okazis dua eĉ pli granda. Multajn tekstojn pri la unua mondmilito kolektis, redaktis kaj publikigis Javier Alcalde kaj José Salguero sub la titolo *Antaŭ unu jarcento. La granda milito kaj esperanto*. La listo de verkistoj kaj tradukistoj ampleksas 39 nomojn.

La sufiĉe heterogenaj tekstoj estas klasifikitaj laŭ tri ĉefaj grupoj. La unua – *La milito* – entenas historiajn kaj politikajn superrigardojn sed ankaŭ memoraĵojn de personoj kiuj iel partoprenis la militon. Do, kaj la makroperspektivo kaj la mikroperspektivo de la milito enestas.

Estas konate ke fratiĝo inter soldatoj de malamikaj armeoj kelkfoje okazis. Pri tia epizodo rakontas franca soldato en

taglibro la 10-an de decembro 1915. Pluvegis dum pluraj tagoj tiel ke kaj la francaj kaj la germanaj soldatoj devis eliri el la tranĉeoj por ne droni, “kaj oni vidis tiam tiun strangan vidaĵon: du malamikaj armeoj unu antaŭ la alia kaj sen pafi iun ajn pafon. Samaj komunaj aferoj proksimigas la korojn”. Francoj kaj germanoj “alridetis unuj la aliajn; paroloj interŝanĝiĝis, manoj etendiĝis kaj interpremiĝis; inter si, oni dividis la tabakon, kruĉeton da kafo aŭ da vino. Ha! Se ni parolus la saman lingvon!”

La plej longa el la mikroperspektivaj eseoj estas la pli ol centpaĝa origine esperantlingva rakonto de Robert Murray: “Miaj aventuroj dum la Granda Milito”. En la komenco de la milito Murray estis 16-jara fervora kristano, kiu opiniis ke “la milito estas maljusta ĉar ĝi estas kontraŭ la pacaj idealoj de Kristo”. Sed kiam li aŭdis de la pastroj, ke temas pri dia batalo, kaj ke ili benis la britajn trupojn, lia opinio ŝanĝiĝis, kaj li fariĝis soldato. “Kaj fine venis la multe dezirata tago” kiam li enŝipiĝis en Southhampton por iri al la batalkampo en Francio. “Mia plej granda timo estis ke eble mi trovus min malkuraĝulo en danĝertempo”, li diras.

Aliaj aŭtoroj rakontas pri simila frua entuziasmo por la milito. Komence de la milito “patriotismo eksaltis” en Rusio. En Francio Marius Paulet notas en sia taglibro pri florbukedoj de la loĝantaro al la soldatoj, kiam la trajno haltis ĉe la stacioj. La militajn teruraĵojn oni spertis pli poste.

La dua ĉefa grupo de tekstoj – *La milito kaj esperanto* –

konsistas el dek pecoj, el kiuj unu estas tiu de Humphrey Tonkin pri Tivadar Soros (patro de la konata grandaktoro sur la financaj merkatoj, George Soros) kaj Julio Baghy. Kaj Soros kaj Baghy estis militkaptitoj en Siberio, kion ili priskribis en konataj esperantlingvaj publikaĵoj. En aliaj eseoj en la dua grupo ni trovas detalojn pri la helpagado inter esperantistoj de malamikaj landoj.

La tria grupo – *Personaj memoroj* – estas malgranda kaj enhavas inter alie kontribuojn de homoj, kiuj ne mem spertis la militon sed rerakontas tion, kion spertis gepatroj kaj aliaj homoj.

Estas interesa libro. Ĝi donas en pluraj kontribuoj personan bildon pri la milito de tiuj, kiuj iel rilatis al ĝi. Ofte dum la legado mi pensis pri la romano *En okcidento nenio nova* de Erich Maria Remarque. Sed diference de tiu libro, la nun recenzata libro ne estas romano sed kolekto de dokumentaj, subjektivaj – kaj tial vivaj – priskriboj kaj analizoj.

La lingva kvalito varias, kiel ofte okazas kiam pluraj personoj kontribuas per verkado aŭ tradukado. Ne ĉiuj el la kontribuintoj majstras la lingvon same bone kiel Zamenhof, Privat, Lanti, Tonkin kaj Ertl.

Bo Sandelin

Javier Alcalde kaj José Salguero (red.), *Antaŭ unu jarcento. La granda milito kaj Esperanto*. SAT-EFK 2018. 375 paĝoj. ISBN 978-2-918053-18-7.

